

### 3. Ĝoju, pordo de l' ĉiel'

1. Ĝo - ju, por - do de l' ĉi - el',  
plej be - na - ta en la mond',  
per - lo de l' sank - tu - la rond',  
ho Ma - ri - a, Di - pa - tri - no, bri - la stel'.

4a strofo: A - men.

The musical score is written on four staves in G major (one sharp). The melody consists of quarter notes and half notes. The lyrics are in Esperanto and are placed below the notes. The first staff ends with a fermata. The second and third staves also end with fermatas. The fourth staff ends with a double bar line. Below the fourth staff, there is a section labeled '4a strofo:' followed by a single staff with a whole note and a double bar line, with the word 'A - men.' written below it.

2. Antaŭ temp' elektis vin  
via Reĝo kun favor',  
por ke en la sankta ĥor'  
estu vi unike Lia servistin'.
3. Pek' neniam nek malhel'  
trompis vin per sia fort',  
portis vin la Dia vort',  
kaj per vi gajiĝis tero kaj ĉiel'.
4. Estu laŭdo kaj ador'  
al la Patro, al la Fil',  
al la Spir' en sama bril'.  
Tra eterno daŭras, Dio, Via glor'.  
Amen.

*SEI GEGRÜSST, DU HIMMELSTÜR • M: Albrecht Kronenberger ĉ. 1980 •  
germana T: laŭ la latina AVE, CÆLI IANUA el la 10a jc. • E (el la germana):  
Albrecht Kronenberger 2003*